# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ EL POLA RADIO

### 3.3. PORPLUVA PREĜO DE ORTODOKSULOJ EN BJALISTOKO

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

**Taskoj:**

*1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj :*
a) en formato MP3:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr02.mp3
aŭ
b) en formato RealAudio :
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr02.rm

**Porpluva preĝo de ortodoksuloj en Bjalistoko**
Por pluvoj preĝis semajnfine ortodoksuloj omaĝantaj la feston de profeto Elio, unu el la plej gravaj figuroj en la ortodoksa eklezio. La ĉefaj solenaĵoj okazis en la ortodoksa preĝejo en Bjalistoko-Dojlidy. [En Podlaĥio regas nunjare granda sekeco, pro tio oni preĝis al s-ta Elio, kredante ke la profeto elaŭskultos la petojn.] (2003-08-15)

*2) Respondu al la subaj demandoj.*

1. Kio estas kurioza en ĉi tiu informo?
2. Pollando estas konata ĉefe pro ĝia katolikeco, sed kiuj aliaj religioj estas flegataj tie?
3. La lasta, interkrampa frazo (troviĝanta en la TTT-eja teksto) forfalis en la voĉa versio. Imagu kialon.

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi nun **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net.